Eduard Ebel,

Flustre falas la neĝ ’

tradukita de Josef Kühnel

Flustre falas la neĝ’.
Lag’ rigidas laŭ leĝ’.
Kristfeste brilas arbar’.
Ĝoju pri Kristo, homar’!

Varma estas en kor’.
Foras ĉiu dolor’.
Fuĝas la vivoamar’.
Ĝoju pri Kristo, homar’!

Sankta nokta lumbril’
kaj ĉiela jubil’
logas laŭ ĉarma fanfar’:
Ĝoju pri Kristo, homar’!

Traduko de la Germana poemo “Leise rieselt der Schnee” de EDUARD EBEL *(Eduardo Ebelo, ∗1839 – †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

MR-012-JK-1 / Arg-99-202 (2010-09-18 19:50:56)

MR-012-JK1